



Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Marto : 4 2022

TALIBANOJ ORDONAS FERMI MEZGRADAJN LERNEJOJN POR JUNULINOJ

Pasintan semajnon, junulinoj en Afganio revenis en gimnaziojn, post sep-monata interrompo ordonita de la novaj regantoj de la lando. Tamen, post kelkaj horoj, la ministerio pri edukado denove ordonis la fermon de la gimnazioj kie junulinoj ricevas instruadon. Respondeculoj de la ministerio informis, ke tiuj lernejoj restos fermitaj, ĝis kiam oni decidis pri la uzo de uniformoj akorde al la ŝario (islama leĝaro). Laŭ informoj de gimnaziestroj, junulinoj devis tiam preni siajn librojn kaj foriri el la lernejoj, ofte kun ploroj.

Deborah Lyons, reprezentanto de Unuiĝintaj Nacioj en Kabulo, diris ke, kiam talibanoj reokupis la regadon en Afganio, lernejoj estis fermitaj pro la krizo KOVIM-19, tamen, post du monatoj tiuj lernejoj malfermiĝis, sed tio ne okazis rilate la mezgradajn lernejojn.

Post la tuja refermo de la gimnazioj, la estraro de la ministerio pri edukado informis, ke estis necese prokrastigi

tiun novan malfermon dum kelke da tempo, ĉar ili bezonis aranĝi strukturojn kun la celo malkunigi gejunulojn 12 /19-jaraĝajn, kaj tiel sekvi islamajn tradicojn. Reprezentanto de la ministerio deklaris, ke ili ne malfermos lernejojn por kontentigi la internacian komunumon, sed por havigi taŭgan edukadon al junulinoj.



Ni volas justicon por la afganaj junulinoj, ni postulas laboron kaj edukadon. Jen la krioj de afganinoj dum manifestacio.

La fermo de la lernejoj por junulinoj provokis manifestacion de dekoj da studentinoj, patroj kaj profesoroj, kiuj amasiĝis ĉe la pordoj de la ministerio pri edukado. Ili postulis la rajton de la junulinoj ricevi edukadon kaj okupi taŭgajn laborlokojn.


Vorto de la Semajno

- Amendi:** 1. Fari per formala proceduro plibonigajn modifojn en leĝo aŭ leĝoprojekto.
2. Korekti erarojn en leĝa dokumento.

Amendo: Ago de tiu, kiu amendas, kaj rezulto de tiu ago.

En la Parlamento ĉiuj politikaj grupoj rajtas proponi amendojn al aprobataj leĝoj.

Sinonimoj: *korekti, reformi, ripari, revizii.*



La Konstitucio de Usono estas unu el la plej malnovaj skribitaj naciaj konstitucioj ankoraŭ validaj. Proklamita en la jaro 1787, la unua amendo al tiu konstitucia teksto estis aprobita en la jaro 1789. Tiu unua amendo celis certigi la liberecon pri religio, esprimado, gazetaro, manifestacio kaj kunvenado.

Informo por membroj de Internacia Jurista Esperanto-Asocio.

Post kelkaj semajnoj aperos nova numero (jam la 20-a) de la revuo *Jura Tribuno Internacia*. Kiel ofte, nia oficiala organo estos sendita per pdf-dokumentoj. Tamen, se iu deziras ricevi ĝin en papera versio, bv. kontakti kun ni kaj ni volonte sendos la paperan revuon al sciigita poŝta adreso. Ni profitus la sendon ankaŭ de la numero 19-a.

Internacia Jurista Esperanto-Asocio www.esperantojuro.org jurista@esperanto.ac